



Supporting language diversity

There are reputed to be between 6000 and 7000 languages in the world, but on average one perishes each week. Language is a purveyor of culture and identity. The death of a language reduces the richness of our world, as surely as the extinction of a biological species.

Apogi lingvan diversecon

En la mondo ekzistas laŭtakse inter 6000 kaj 7000 lingvoj, sed el ili pereas averaĝe po unu ĉiusemajne. Lingvo estas esenca esprimo de kulturo kaj identeco. La morto de lingvo limigas la riĉecon de nia mondo, samcerte kiel la morto de biologia specio.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj International League of Esperantist Instructors



Jen celoj de ILEI: These are aims of ILEI:

Striving for justice in communication

Justice demands the right for people to preserve their own language heritage, which might include the use of a local language, a national tongue and another for use in transnational contacts. We need a solution for international use that does not endanger the continued existence of lesser spoken local and national languages. There is a viable solution on offer – Esperanto.

Celi al komunika justeco

Justeco postulas la rajton por homoj konservi sian propran lingvan heredaĵon, kiu eble inkluzivas la uzon de loka, ŝtata aŭ nacia lingvo kaj alia por transnaciaj kontaktoj. Ni bezonas solvon por internacia uzo, kiu ne endanĝerigas la daŭran ekziston de malpli parolataj lokaj kaj naciaj lingvoj. Funkcia solvo estas je dispono – Esperanto.





Working for peace

Esperanto provides an ideal medium to unite people striving for peace and equitable, sustainable development. This is because almost all speakers have consciously decided to use the language: that means they tend to be already internationally-minded and socially aware.

Kultivi pacon

Esperanto formas idealan ilon por unuigi homojn strebantajn al paco kaj egalbaza, daŭrigebla evoluo ĉar preskaŭ ĉiuj ĝiaj parolantoj konscie decidis ekuzi la lingvon tiucelen; sekve ili emas esti jam internacie orientitaj kaj socie engaĝitaj.



Esperanto in a nutshell

Esperanto is a „brilliant synthesis“ (Antoine Meillet) of the best elements drawn from a broad range of languages, invented to enable communication between people from different countries and cultures. Thanks to its precise and regular structure it is easier to learn than national languages. Unlike national languages it allows people to communicate on an equal footing,





each one having taken the trouble to learn it. Created in 1887 by Dr. L. Zamenhof, its use by a lot of speakers in more than 125 states shows that this evolving language excellently repays the attention of all those who seek exchanges with people from other countries without resorting to interpreters or to any one dominant language. Its wider use would allow the presentations from speakers at international conferences to be judged by their ideas and content, not on the speaker's proficiency in one of the stipulated languages.

Esperanto koncize

Esperanto estas „genia sintezo“ (Antoine Meillet) de la plej bonaj elementoj tiritaj el vasta gamo de lingvoj, ellaborita por ebligi la komunikadon inter la popoloj de malsamaj landoj kaj kulturoj. Danke al sia preciza kaj regula strukturo ĝi estas pli facile lernebla ol la etnaj lingvoj. Kontraŭe al tiuj ĝi permesas komuniki egalrajte inter la popoloj, ĉar ĉiu faris la strebon ĝin lerni. La uzo de ĉi tiu evoluema lingvo, en 1887 proponita de d-ro L. L. Zamenhof kaj uzata de signifa parolkomunumo en pli ol 125 landoj en la mondo abunde pravigos la investojn de ĉiuj, kiuj deziras interagi kun eksterlandanoj sen dependi de interpretistoj aŭ de alia hegemonia lingvo. Ĝia pli vasta uzo rezultigus, ke la prezentaĵoj de prelegantoj en internaciaj konferencoj estu taksataj laŭ siaj ideoj kaj laŭ sia enhavo, kaj ne laŭ regonivelo atingita en la postulataj lingvoj.





Criteria for an international language

An effective, just language for international use should be:

- Clear in meaning – not ambiguous or vague
- Transparent in structure
- Phonetic – speech and writing in harmony.
- Optimally learnable – in reach of all.

Kriterioj por internacia lingvo

Efika, justa lingvo por internacia uzo estu:

- Klara laŭ signifo – ne dusenca aŭ malpreciza
- Travidebla laŭ strukturo
- Fonetika – parolo kaj skribo en harmonio
- Optimume lernebla – je dispono de ĉiu.

How does it fulfill the criteria we identified?

Kiel ĝi plenumas tiujn kriteriojn?

Clear in meaning:

Esperanto avoids homonyms (read/reed; caught/court, rays, raise...) words with multiple pronunciations (wind, record,) and words with multiple meanings. It avoids words that perform different grammatical functions without changing form (for example, in English ‘round’ can be a noun, adjective, adverb, preposition or a verb).

Klareco de signifo:

Esperanto evitas homonimojn, vortojn kun malsamaj eblaj prononcoj kaj plursignifajn vortojn; ĝi evitas vortojn, kiuj plenumas diversajn gramatikajn funkciojn senmodife (ekzemple en la angla la vorto ‘round’ povas roli kiel substantivo, adjektivo, adverbo, prepozicio aŭ verbo).

Transparent in structure:

Esperanto marks the grammatical function of each word: -o for nouns, -a for adjectives, -e for adverbs, -as, -is –os for verbs in past, present, future, etc. This makes parsing a sentence easy, and the intended meaning clear.





Travidebla strukturo:

Esperanto markas la gramatikan rolon de vortoj: -o por substantivoj, -a por adjektivoj, -e por adverboj, -as -is -os -u por verboj nunaj, pasintaj, futuraj kaj imperativaj ktp. Sekve fraz-analizo facilas kaj la intencata signifo estas pli klara.

Phonetic:

This means each of the 28 letters in the alphabet consistently represents only one sound. There are no silent letters. This yields huge time saving in a school curriculum; spelling simply does not consume countless hours as it does with highly unphonetic languages as English and French.

Fonemika : Unu sono por unu litero, unu litero por unu sono.

Ĉi tio signifas, ke ĉiu el la 28 literoj de la alfabeto konsekvence reprezentas nur unu sonon; ne ekzistas silentaj literoj. Tio liveras grandajn tempoŝparojn en lerneja studplano; literumado simple ne forkonsumas amason da horoj, kiel okazas ĉe malpli fonemikaj lingvoj, kiel la angla kaj franca.

Optimally learnable – in reach of all:

Thanks to the above, Esperanto can be learnt to a useable degree by the vast majority of the world's people – aptitude and cost scarcely form a barrier. A feeling of early success is crucial to forming positive attitudes for further language study. While Esperanto is a fully-edged functioning language, its more challenging parts do not hinder fast early progress. Studies show it to be between 5 and 10 times easier to learn than other languages. The language has proven value in laying a solid foundation for those aiming to master further foreign languages. The speech community behind it, spread through over 120 countries, opens huge possibilities for intercultural learning and experiences.

Optimume lernebla – je dispono de ĉiu

Danke al la supraj skizaĵoj Esperanto estas lernebla ĝis uzebla grado de grandega plimulto de la popoloj de la mondo – lingva kapablo kaj kosto apenaŭ formas baron. Frua sukceso esencas por la formiĝo de pozitiva sinteno al plia lingvo-lernado. Esperanto ja estas plenformita funkcia lingvo, ĝiaj pli defiaj partoj ne malhelpas rapidan fruan progreson. Studoj montras ĝin inter 5- kaj 10-oble pli facile lernebla kompare kun aliaj lingvoj. La lingvo havas atestitan valoron en la fikso de solida bazo por tiuj strebantaj ellerni pliajn fremdajn lingvojn. La parol-komunumo malantaŭ ĝi, vastiĝinta tra pli ol 125 landoj, malfermas enormajn eblojn por interkultura spertado.






ILEI and its aims

Present in 70 countries, with 41 national affiliates, ILEI provides a transnational professional platform for teachers who speak Esperanto. It also aims to **promote** the teaching of Esperanto, both in schools and via the Internet, **train** teachers, **arrange** examinations, **produce** modern teaching materials and **bring together**.

ILEI kaj ĝiaj celoj

Ĉeestanta en 70 landoj, kun 41 landaj sekcioj, ILEI donas transnacionan profesion bazon por instruistoj kiuj parolas Esperanton. Ĝi celas krome akceli la instruadon de Esperanto, kaj en lernejoj kaj pere de la reto, trejni instruistojn, okazigi ekzamenojn, eldoni modernajn lernilojn kaj kunigi kaj organizi instruistojn de Esperanto kaj iliaj lernantoj.



ILEI's magazines

The league publishes two journals: its official organ Internacia Pedagogia Revuo for teachers and Juna Amiko for learners of the language.

ILEI kaj eldonaĵoj

La Ligo aperigas du revuojn: sian oficialan organon *Internacia Pedagogia Revuo* por instruistoj kaj instruantoj kaj *Juna Amiko* por lernantoj.



ILEI and its meetings

ILEI organizes an annual conference, with professional, practical and social strands in the program. The list of recent conferences attests the league's growing international reach: 2007 Ranzan (Japan); 2008 Porto Novo (Benin), 2009 Cracow (Poland), 2010 Matanzas (Cuba), 2011 Copenhagen (Denmark), 2012 Kunming (China – see the photo), 2013 Herzberg (Germany), 2014 Montevideo (Uruguay), 2015 Oostende (Belgium), 2016 Nyiregyhaza (Hungary), 2017 Busan (Korea), 2018 Madrid (Spain).





Our programmes allow children from different countries to discover each others' cultures by means of a common language: dozens of such projects have been realized within the framework of the European Comenius and Grundtvig.

ILEI kaj ĝiaj renkontiĝoj

ILEI organizas ĉiujaran konferencon, kun fakaj, organizaj kaj distraj fadenoj en la programo. Listo de lastatempaj konferencoj atestas pri la kreskanta internacieco de la ligo: 2007 Ranzan (Japanio); 2008 Porto Novo (Benino), 2009 Krakovo (Pollando), 2010 Matanzas (Kubo), 2011 Kopenhago (Danlando), 2012 Kunming (Ĉinio – vidu la bildon), 2013 Herzberg-Sieber (Germanio), 2014 Montevideo (Urugvajo), 2015 Oostende (Belgio), 2016 Nyiregyhaza (Hungario), 2017 Busano (Koreio), 2018 Madrido (Hispanio).



Niaj programoj ebligas al infanoj el malsamaj landoj malkovri la kulturojn unu de la alia danke al komuna lingvo: plurdekoj da tiaj projektoj estis realigitaj kadre de la eŭropaj programoj *Comenius* kaj *Grundtvig*.





ILEI has a website in Esperanto: www.ilei.info.

For traditional mail or pre-arranged visits:

ILEI/ICH, Grubenhagen u. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germany;
tel./fax: (+49) 5521-5983

Other useful contacts:

www.lernu.net: Multilingual website with courses in 33 languages.

www.edukado.net: Site for teachers of Esperanto: catalogues of teaching materials and resources – textbooks, films, audio, exercises, teaching plans and contact information for establishing joint programmes. The site is largely in Esperanto.

<https://en.duolingo.com/register> Website with courses in several languages and Esperanto.

www.esperanto.net Website with informations and facts about Esperanto in several languages.

In Poland: The University Adam Mickiewicz (UAM) has a program about interlinguistics for persons with a university degree. This three-year program provides the students with basic knowledge about planned languages, international communication and Esperanto (language, literature, history) and offers a specialization concerning the teaching of Esperanto during the third year.

<http://www.amu.edu.pl/~interl/>

In Britain:

www.springboard2languages.org: The „language-launcher“ is a linguistic project for the British elementary school. In it one uses Esperanto as an instrument to facilitate the acquisition of other foreign languages and to develop transferable capabilities.

By the United Nations in New York and Geneva:

www.linguistic-rights.org

Contact information:

Ilei.prezidanto@gmail.com

Ilei.sekretario@gmail.com

Ilei.officejo@gmail.com

